# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 23/06/2022 Kvincentokdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*

*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 715,500 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 299,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 168,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 149,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 99,500 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

"Ĝis la tigro lernos skribi, ĉiu Libro gloros la Ĉasiston" —— Hinda proverbo

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



# la [esperanta retradio](esperanta retradio)



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

JUDY GARLAND - DE MITO AL SIMBOLO
17A JUNIO 2022



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 19 de "Por Progresantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Ĉu la vorto "arbeto" estas originala vorto?
2). Ĉu la vorto "etulo" estas originala vorto?
3). Kiu(j) estas la diferenco(j) inter la vorto "sentema" signifanta "plena de sento" kaj la vorto "sentema" signifanta "kun nenia temo"?
4). Jen kelkaj ekzemploj de la subjunkcio "ke": **Kiel Subjekto**: "KE LI SUKCESIS, impresas min. **Kiel Objekto**: "Ni scias, KE LI SUKCESIS". **Kiel Adjekto**: "Mi komencis la laboron, KE LI DAURIGU ĜIN." **Kiel parto de la Subjekto**: "Lia promeso KE LI REVENOS plaĉas al mi." **Kiel parto de la Objekto**: "ni ricevis la novaĵon KE ŜI SUKCESIS". **Kiel parto de la Adjekto** "Ni gratulis ŝin pro tio KE ŜI SUKCESIS".

<u>**TASKO**:</u> Ŝanĝu ĉiujn ĉi suprajn frazojn en frazojn sen "ke" (ekz.: "Ke li revenis, mirigas min" >"Lia reveno mirigas min".

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 588 *Marcel Leereveld.*



Viro revenis hejmen iun vesperon kaj trovis sian gravedan edzinon naskonta.



Nu, kion faras saĝulo? Li tuj telefonis al la malsanulejo:

"Mia edzino estas preskaŭ tuj naskonta, nun ŝi estas naskanta, diru al mi kion mi devas fari!"

"Ĉu tiu estas ŝia unua infano"? Demandis la kuracisto en la fino de la telefono.

"Ĉu vi frenezas"? Demandis la viro. "Mi estas ŝia edzo"!

*Bob Felby*



**3ZZZ……** La grava informo de la elsendo de la 20a de junio 2022 estas la prezentado de Charles Stevenson de la libro, kiun li estas preparanta pri la Esperanto-movado en Aŭstralio. Ni esperas ke ĝi estos preta por la kongreso organizita de la Aŭstralia Esperanto -Asocio en januaro 2023 kaj kiu okazos en Melburno *Franciska Toubale*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). Jes, ĝi estas originala vorto kun sufikso.
2). Jes, ĝi estas originala vorto el sufikso (kaj kun sufikso).
3). La unua estas vorto (verbo) kun sufikso (-ema), kaj la dua estas vorto (adjektivo el verbo) kun prefikso (sen).
4). "Lia sukceso"; lian sukceson; por igi lin daŭrigi ĝin; reveni; pri ŝia sukceso; pro ŝia sukceso. *Marcel Leereveld.*

# Petante korespondanton




lo Saluton Kara ,

Mi nomiĝas Augustin Kakozwa , kongano de la Respubliko Demokratia Kongo , loĝanto en la urbo Goma , kien mi instruas Esperanton al la infanaj georfoj kiuj nia Asocio Nova Familio prizorgas .

Hazarde mi trovis vian retadreson , tial mi profitas per ĝi retmesaĝi , petante ekkorespondi kun vi , laŭ via deziro . Mi alkroĉas foton pri la infanoj, kiujn mi instruas, kaj ankaŭ pri la loko de nia asocio . Mi ĝojos legi vian respondon . Amike *Augustin Kakozwa.*

Augustin KAKOZWA <augukako@gmail.com>